

Eldonantaro:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa (Varsovio)
W. M. Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norfa, komercisto, Barcelona
H. Fischer, grandindustriisto, București
Teo Jung, Horrem b. Köln
Frans Schoofs, Antwerpen (Anvers)
P. v. Medem, bank- kaj fabrikdirektoro, Kaunas.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimeno kaj unua numero de nova abono.

Oficiala Organo de la XV-a Universala Kongreso de Esperanto. — Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Tendenco: Neŭtrala - Tolerema - Esperantista - Internacia - Universala.

Aperas semajne. — Senpagaj aldonoj: „Internacia Komerco“ (praktika) kaj monata „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Administristaro:

(sufiĉa adreso)
Esperanto Triumfonta,
Horrem bel Köln, Germani.

Redaktistaro:

Ĉefredaktisto: Teo Jung.
Kunredaktisto: M. Butin, L. K.
Literatura redaktisto: Zanonj.

Kunlaborantoj

inter la Esperantistaro de la tutmondo.
Manuskriptoj oni akribu nur sur unu flanko de la papero.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimeno kaj unua numero de nova abono.

Antwerpen-Anvers, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem b.Köln, Kaunas-Kowno, Paris, Warszawa

La Favora Germana Registaro.

La Ministro por Internaj Aferoj atentigas per oficiala letero la landajn registarojn pri la Dekkvina. Plifaciligado de envojaĝo en la kongreslandon.

Laŭ multaj leteroj, alvenantaj al ni ĉiutage, ekzistas ĉiam ankoraŭ granda maltrankvilo ĉe eksterlandaj kongresanoj, ĉu ili ricevos la necesan pasvizon kaj eventualajn favoraĵojn. Estas ja kompreneble, ke ekvojaĝante al la ĉiara kongreslando, oni deziras absolutan certecon pri ĉio ajn, kaj ne nur lastminute, sed jam nun, por eventuale alle aranĝi siajn feriajn projektojn. Tamen ni devas peti niajn amikojn je iom da pacienco.

Tage, eĉ hore ni atendas definitivajn kaj detalan decidon el Berlino, por komuniki ĝin en nia 6-a ĉirkulero. Laŭ informoj de nia decernento Profesoro D-ro Dietterle, la registaro principe jam konsentis, ke ĉiuj germanaj ambasadoroj kaj konsuloj en eksterlando estos instruciataj doni pasvizojn laŭ la kongreskarta certifikato; ankaŭ malpligo de la vizkostoj estas promesita. Aliaj favoraĵoj estas atendebaj. Kiu diris „a“, tiu diros ankaŭ „b“. La dankinda akcepto de la honorprezidenteco flanke de la Respublika Prezidanto forigis multajn malfacilaĵojn kaj ebenigas la vojon por plua sukceso. Kia vento blovas ĉe la oficialaj instancoj, montras rondskribaĵo, kiun s-o Oeser, ministro por internaj aferoj, elirigis al la ministroj por eksteraj, ekonomiaj kaj trafikaj aferoj, plue al ĉiuj germanlandaj registaroj. Ĝi tekstas jene:

Der Reichsminister des Innern.

III 4049.

An das Auwärtige Amt, den Herrn Reichswirtschaftsminister, den Herrn Reichsverkehrsminister, sämtliche Landesregierungen.

Betreff: Esperanto.

Berlin, NW., 16. Mai 1923.

Im August dieses Jahres findet in Nürnberg der XV. Internationale Esperanto-Kongress unter dem Ehrenprotectorat des Herrn Reichspräsidenten statt. Das Esperanto-Institut für das Deutsche Reich hat mich gebeten, die Regierungen der Deutschen Länder auf den Kongress aufmerksam zu machen und sie zu seinem Besuch einzuladen. Ich komme dieser Bitte gerne nach, da ich der Esperanto-Bewegung eine ernsthafte Bedeutung beimesse. Die Welthilfssprache scheint mir wegen ihrer reichen Erlebniskraft geeignet, auch den Kreisen der bisher nur einsprachig gebildeten Volksgenossen die Vorteile einer fremden Sprache zu vermitteln; ferner scheint sie mir das wertvolle Ziel zu verfolgen, auf die friedliche Zusammenarbeit der Nationen unter Wahrung ihrer Rechte und ihrer Eigenarten und auf die Anbahnung guter zwischenstaatlicher Beziehungen hinzuwirken. Die Vertreter der deutschen Regierungen werden auf diesem Kongress Gelegenheit haben, einen Eindruck von dem Wert der Esperanto-Sprache zu erlangen und sich davon zu überzeugen, in welchem Maße Esperanto die Ansprüche erfüllt, die an eine internationale Welthilfssprache zu stellen sind.

Ein Kongressprogramm füge ich bei.

Oeser.

Ke ankaŭ la bavara registaro nepre aligis sian ĝis nun malfavoran al eksterlandanoj sintenadon, pravas la jena oficiala komuniko, rondirinta antaŭ nelonge la tutan gazetaron:

La bavara fremdultrafiko.

Por reguligo de envojaĝo kaj restado de eksterlanduloj la estraroj ricevis lastatempe novajn instrukciojn, sekvintajn el la gvidpunktoj, kiujn la regna registaro antaŭ nelonge

La regna ministro por Interno.

III 4049.

Al die offico por ekstero, sinjoro la regna ministro por ekonomio, sinjoro la regna ministro por trafiko, ĉiuj landaj registaroj.

Koncerne: Esperanto.

Berlin NW., 16. majo 1923.

En aŭgusto de nuna jaro okazos en Nürnberg la XV-a Internacia Esperanto-Kongreso sub honora protekto de sinjoro la Regna Prezidanto. La Esp. Instituto por la Germana Regno petis min atentigi la registarojn de la germanaj landoj pri la kongreso kaj inviti ilin al ties vizito. Mi volonte plenumas tiun peton, ĉar mi opinias, ke la Esp. movado havas seriozan signifon. La mondhelpingvo ŝajnas al mi — pro sia facila lernebleco — taŭga por peri la avantaĝojn de ĉio de fremda lingvo ankaŭ al la randoj de regnaroj ĝis nun nur unulingvaj; plue ĝi ŝajnas al mi sekvi la valoran celon akceli pacan kunlaboradon de la nacioj, konservante iliajn rajtojn kaj propecojn, kaj la ekigon de bona interŝtata rilatoj. La reprezentantoj de la germanaj registaroj havos dum tiu ĉi kongreso okazon por ricevi impreson pri la valoro de la lingvo Esperanto kaj por konvinkigi, ĝis kiu grado Esperanto plenumas la pretendojn, kiujn oni devas fari pri internacia mondhelpingvo.

Unu kongresprogramon mi a'donas.

Oeser.

kreita en la aŭtuno de antaŭa jaro, laŭ kiu restadpermeso estas donebla nur post pruvo de grava kialo. Supoze ke ĉia provokema, diboĉa konduto estos evitata, la estraroj donos restadpermeson de nun — krom por komercaj aferoj — ankaŭ por kuraco, por vizito al parencoj, por vojaĝo cele de studoj kaj refreŝigo, por partopreno al kongresoj kaj sportaj aranĝoj, por vizito al festuloj kaj ankaŭ sociataj vojaĝoj estos permesataj. Por ne ĝeni la permesitan vojaĝan trafikon per nenecesaj malfaciligoj, ek-

zistas nova instrukcio, laŭ kiu la estraroj pli ol ĝis nun donu permeson por restado en tuta Bavarujo kaj liberigon de la devo de persona sinanonco.

La nova instrukcio estas ordonita por eviti malutilon al la multaj valoraj generalaj kaj precipe kultural rilatoj inter Bavarujo kaj la eksterlando kaj ankaŭ por eviti unuflankan domagojn al la ekonomiaj randoj en Bavarujo dependantaj de la fremdultrafiko.

Koncerne al la invitoj al la eksterlandaj registaroj, la Berlina Registaro montris sin ema agi laŭ la tradicio; do, se oficiala invito flanke de la registaro okaze de antaŭa kongreso estas pruvebla, oni sekvas tiun ekzemplon. La K. K. K., kies informojn ni petis, sendis al ni kelkajn dokumentojn. Se iu kongresprezidanto aŭ komitatano povas doni al ni pluajn fidindajn scigojn, la L. K. K. volonte uzos ilin. Ne ricevinte tiajn informojn post 8 tagoj, ĝi senpere dissendos la oficialajn invitojn al ĉiuj eksterlandaj registaroj, petante samtempe favoraĵojn pri pasporto kaj fervojo.

Ĉiujn taŭgajn sugestojn ni danke akceptos.

Loka Kongresa Komitato.

La situacio kaj ĉirkaŭaĵo de Nürnberg.

Nürnberg, la fama trezorejo de Germanujo, estas lokita sub 49°27'1/2' norda latitudo kaj 11°41'1/2' orienta longitudo de Greenwich, 510 m super la marnivelo. Ĝi kuŝas plejparte en ebena, kiu estas limigata parte de la flankaj montoj de „Franka Jura“, parte de la rokaj montoj de la kastela sploŝtono. La urbo estas superstarata de la impona kastelo, kiu speciale suden donas belegan rigardon sur la domaron kun la antikvaj, altaj, ruĝaj tegmentoj kaj sur la ĉirkaŭaĵoj. De la kastelo ni vidas ankaŭ la riveron „Pegnitz“, kiu dividas Nürnberg en du partojn, la Sebalda kaj Lorena urbparto, nomataj laŭ la du ĉefpreĝejoj. Sur la suda Lorena parto estas la stadidomo kaj la ĉefaj stratoj kaj hoteloj. En la nordo de la urbo etendiĝas tre fekunda ebena, la „ajla“ lando, limigata de la imperia arbaro kaj malproksime de la juraj montoj. La areo estas ĉ. 6600 ha, tiu de la malnova urbo 160 ha. La periferio de la tuta areo estas ĉ. 80 km, de la interna urbo ĉe la eksteraj urbomuroj 5148 m.

Nürnberg distingiĝas pro sia valsituacio inter malkrute leviganta altajaro per tre modera kaj milda klimato. La meza jartermperaturo estas +8°, la meza somertemperaturo 17°. La meza aerpreso estas 734,6 mm. Ni do esperas, ke la kongresanoj ankaŭ tiurilate estos kontentigitaj.

Ĉar la urbo estas en la centro de la interkomunikiĝo inter nordo kaj sudo, oriento kaj okcidento, la ekspresvagonaroj en la bohemiajn banlokojn, al Paris kaj Calais (London), el Wien kaj Budapeŝto veturas tra Nürnberg. La ĉefaj fervojaj linioj estas la jenaj:

Nürnberg—Regensburg—Passau—Wien.
Nürnberg—Amberg—Furth i. W.—Pilsen—Prag.
Nürnberg—Pleinfeld—München—Innsbruck—Verona aŭ—Salzburg—Graz.
Nürnberg—Pleinfeld—Donauwörth—Augsburg—Lindau.
Nürnberg—Crailsheim—Stuttgart—Karlsruhe—Strassburg.
Nürnberg—Würzburg—Frankfurt—Köln aŭ Heidelberg.
Nürnberg—Bamberg—Probstzella—Halle—Berlin aŭ Hamburg.
Nürnberg—Bamberg—Hof—Leipzig—Berlin aŭ Dresden—Breslau—Posen—Königsberg.
Nürnberg—Schnabelweld—Eger—Karlsbad.
Nürnberg—Bayreuth—Hof—Leipzig—Berlin.

La novajn veturprezojn ni publikigos baldaŭ. Miloj kaj miloj da fremduloj el ĉiuj landoj vizitas ĉiutage la juvelon de Germanujo por admiri ĝiajn antikvajn beliaĵojn. Forveturante al Svisujo kaj Tirolo en la bavariajn arbarojn aŭ montojn, ili gardos en si la unike grandiozan impreson de tiu impona urbo. Pri ĝiaj vidindaĵoj ni jam raportis en specialaj artikoloj. Ankaŭ ĝia

MALRIĈA EN SPIRITO.

Teatraĵo en du aktoj kaj unu interakto.

Originale verkita de H. J. Bullhuls, L. K.

(6-a Daŭrigo.)

Serĝento. Nu, al ĉiu estas permesate rigardi — aŭ ne rigardi. (Kun surprizo.) Diablo, kaporalo — vi ne fumis!

Kaporalo. Ne, serĝento, mi ne fumis.

Serĝento. Jen io eksterordinara, kion mi raportos al la kapitano, se li revenos. Alitempe vi ja fumis konstante la tutan tagon, kaj nun vi sidas tie sen via pipo — kaj ne fumis?

Kaporalo. Mia pipo rompiĝis — kaj mi havas dentdoloron, serĝento.

Serĝento. Dentdoloron? Elŝiru tiun denton!

Kaporalo. Kun via permeso —, estas tri jam eligintaj dentoj jen en la antaŭa parto de la buŝo, kiuj tiel doloras min.

Serĝento. Jen refoje io eksterordinara por raportoj! Eligintaj dentoj, kiuj doloras. Hahaha! (Rigardante la poŝhorloĝon.) Ankaŭ dek-sep minutoj! Kiel rapide pasas la minutoj! Ĉu la regnanta doktoro elŝiris ilin?

Kaporalo. Speciala doktoro faris tion laŭ neordinara maniero kaj per speciala denttirilo.

Serĝento. Ne moku superulon, mi petas, ĉar ankaŭ tion mi devos raportoj al la kapitano.

Kaporalo. Mi ne mokas, serĝento. Speciala dentisto persone forigis ilin — per speciala denttirilo.

Serĝento. Elbatis ilin?

Kaporalo. Ne elbatis, ne elŝiris, sed forigis ilin laŭ speciala maniero.

Serĝento. Hehel!

Kaporalo. Aŭskultu! Vi scias, ke mi estas pasia fumanto. Ĉiam mi fumis, eĉ se mi kuŝas sur tiu ripozejo. Hieraŭ mi promenis sur la korto kaj —

Serĝento. — kaj fumis —

Kaporalo. — mi fumis, sed sur loko, kie tio estas malpermesita.

Serĝento. Diablo! Apud tiu magazeno —

Kaporalo. Jes, pro la malmulto da pulvo, kiu estas konservata tie en fera kesto — kaj sur bone kaŝita loko —

Serĝento. Ne faru tiajn rimarkojn, mi petas! Sed rakontu plue!

Kaporalo. La kapitano tion ekvidis kaj forbatis la pipon per la pugno; sed mi antaŭvidis la baton kaj ĝustatempe malfermis la buŝon —

Serĝento. Tio estis saĝe farita.

Kaporalo. Mi ĝojis, ke la afero finiĝis per tio. Sed kiam la kapitano estis for, mi rekapitis mian pipon kaj denove ekfumis.

Serĝento (surprizite). Sur tiu sama loko?

Kaporalo. Ho ne! Tion mi ne kuraĝis. Sed aŭskultu plue! Du horojn poste mi ne pensis plu pri la pugnobato de la kapitano kaj denove mi promenis tre okaze sur tiu sama loko kun la pipo en mia buŝo —

Serĝento. Kaj vi fumis?

Kaporalo. Jes, mi fumis. Subite iu, kiun mi ne estis vidinta, ordonis post mi: „Kaporalo, atenton!“ — Mi ekhaltis.

Serĝento. Nature, vi ekhaltis.

Kaporalo. Tiu sama voĉo ordonis plue: „Kapo... dekstren!“ Mi obeis. Poste tiu sama voĉo ordonis: „Senmove!“ Kaj mi staris senmove, tute ne komprenante la sencjon de tiuj ordonoj. Mi atendis pluan ordonon; sed subite pistola pafo eksplodis post mi, kaj samtempe malaperis mia pipo kaj tri el miaj belaj dentoj.

Serĝento. Hahaha! Mil diabloj! Tio estis bone trafita! Mi admiras tiun pafinton —

Kaporalo. Kaj tiu pafinto, kiun vi tiel admiras, estis, kun via permeso, la kapitano proprapersono.

Serĝento. Mil diabloj! Kaj kion li diris — post tiu pafo?

Kaporalo. Nenton. Li iris for, eĉ ne rigardante min plu kaj lasis min tie sen mia pipo kaj sen miaj belaj dentoj. Kaj tial mi nun ne fumis.

Serĝento. Hahaha! (Al la aliaj.) Kaj pro tio vi nun ne ridas? Ho, mi komprenas — vin iom post iom kaptas la teruro pro tiu fariganta, alla pafo! (Rigardas la poŝhorloĝon.) Ankaŭ dek-tri minutoj! (Oni aŭdas la paŝojn de alproksimiĝantaj soldatoj.) Jen ili venas. Atenton!

La kvar soldatoj sur la ripozejo ekstaras antaŭ ĝi. La Serĝento Peti, la Kaporalo kaj la kvara soldato ĉe la fenestro ekstaras ankaŭ.

Ekstersceneje je la fundo marŝas preter la malfermita dekstra pordo deko da armitaj soldatoj kun oficiro kaj serĝento. Kiam la lasta soldato pretepas, ili ĉiuj ekhaltas.

Sesa sceno.

La antaŭaj, Serĝento kun du armitaj soldatoj, Johano, Oficiro.

Eniras la Serĝento kun du el la armitaj soldatoj: meze de la du soldatoj estas Johano. Ili ekhaltas en la mezo de la scenejo. Johano staras inter la du soldatoj, la Serĝento post Johano.

Post momento eniras Oficiro; li eksidas ĉe la tablo, elpoŝigas kelkajn paperojn, metas ilin sur la tablon kaj ekzamenas ilin.

Oficiro (post momento, al Johano). Ĉu vi estas la forkurinto Dupuis?

Johano (ne respondas).

Serĝento (puŝas lin per la kubuto). Respondu!

Oficiro (pli laŭte). Ĉu vi estas la forkurinto Dupuis?

Johano. Jes... Dupuis... naskiĝinta la duan de januaro mil septcent naŭdek dua...

Oficiro (iom surprizite, ekzamenas la antaŭ li kuŝantajn paperojn). Tio akordiĝas kun la dokumentoj.

Johano (daŭrigas, alligante la fingron). Nazo — rekta; mentono — ronda; okuloj — brunaj; haroj —

Oficiro (interrompas lin). Kaj tiel plu. Sufiĉas! Respondu nur al tio, kion mi demandas. — Vi scias, ke vi forkuris el la armeo kaj jam konfesis tion. Vi scias ankaŭ, ke tiu forkuro estas krimo kontraŭ la patrujo kaj estas punata per mortpuno.

Johano. Oni mortpafos min.

Oficiro. Kompreneble, oni mortpafos vin — kaj eĉ post kelkaj minutoj. Sed antaŭe mi devas demandi, ĉu vi havas ankoraŭ kelkajn plenumebajn dezirojn. Respondu!

Johano (ne respondas, levas la fingron kaj rigardas la oficiro kun streĉita atento).

Oficiro. Respondu! Ĉu vi havas kelkajn plenumebajn dezirojn?

Johano (atendas momenton, tiam subite). Mi havas.

Oficiro. Kiaj estas tiuj deziroj?

Johano. Ke mia patrino ne ŝpinu plu! Oficiro (surprizite). Ke... kion?

Johano. Ke mia patrino ne ŝpinu plu!

Oficiro (levas la ŝultrojn). Tio estas afero, pri kiu la armeo ne povas okupi sin. Ŝi ŝpinu aŭ ne ŝpinu laŭ sia propra plaĉo. (Li atendas momenton.) Ĉu vi havas alian plenumeban deziron?

ĉirkaŭaĵo prezentas multan belon, kvankam ĝi ne havas la majeston de la altmontaro kaj la forton de la maro. Proksime al la urbo troviĝas la grandega imperia arbaro, kiu estas atingebla piede aŭ tramvoje en mallonga tempo kaj kiu pro sia ĉarmo instigas la urbanojn al promenadoj kaj ekskursoj. La regiono enhavas la antikvajn restaĵojn de iamaj kasteletoj kaj somerrestadejoj de la antaŭaj patricoj, la historiajn lokojn, kiuj rememorigas pasintajn malpacojn kaj batalojn. Sed speciala prefero de la franka pejzaĝo estas la granda diverseco de najbaraj mezaltaj montoj. Ĉarmaĵo estas la regionoj de la „Franka Jura“, speciale la „Hersbruck'a kaj Franka Svisujo“. La unua kun siaj belaj arbaroj, montoj kaj kastelruinoj troviĝas 30 km oriente de Nürnberg en la supra valo de la Pegnitz (Pegnic). Ankoraŭ pli allogaj estas la valoj, riveretoj, muelejoj, kavernoj kaj arbaroj de la pitoreska „Franka Svisujo“, kiu etendiĝas 40 km norde de Nürnberg inter la urboj Erlangen, Bamberg kaj Bayreuth.

Multajn belajn ankaŭ prezentas en la sudokcidento la „Franka Altaĵo“ kun la malnova markgrafurbo Ansbach kaj la antikva Rothenburg o. T., kie la kongresanoj rigardos la historiajn festludojn. En la sudo kaj sudoriento invitas la migrulno la urbetoj Altdorf, la sidejo de la fama Nürnberga universitato, Schwabach, Roith, Weissenburg kaj Pappenheim en la bela valo de la Altmühl-rivereto. En la nordokcidento kaj nordo la montoj de la Steigerwald (Steiger-arbaro) kaj de la Fichtelgebirge (Fichtel-montaro) estas facile atingeblaj.

Se la kongresano post fervora laboro kaj multflankaj plezuroj volas ĝui la ĉarmon kaj trankvilon de la naturo, la ĉirkaŭaĵo de Nürnberg prezentas al li multajn okazojn. Se vi preferas la nekovritajn pintojn de la Alpoj, la glaciejojn kaj montlagojn, vi povas ilin atingi post kelkhora veturado. La grandioza de tiu montara naturo refreŝigos viajn nervojn kaj korpon kaj trankviligos koron kaj animon.

Otto Pilhofer.

La fakkunsidoj dum la XV-a.

De la Ĝeneva Kongreso (1896) estiĝis iom post iom tradicio ĉe niaj Universitaj Kongresoj, ke la anoj de la samaj profesioj, fakoj kaj movadoj aranĝas specialajn kunvenojn por prepari siajn favordeojn kaj interesojn kaj internacie unuigi sin al komuna laboro. Kaj oni povas diri, ke apud la ĝeneralaj laborkunsidoj ili estas hodiaŭ konsiderinda faktoro kaj grava parto de la kongresprogramo. Aliflanke montriĝis, ke la rezultoj ne ĉiel respondis la atendojn, ĉu pro malmulnombro de la partoprenantoj, ĉu pro nesufiĉa preparo de la kunsidoj. Tio estis des pli bedaŭrinda, ke ekzistis nekontestebla intereso por tiaj laborkomunumoj ĉe la kongresano.

Ankaŭ por la Nürnberga Kongreso estis jam anoncataj surprizige multaj fakkunsidoj, kiujn ni laŭvice publikigis en niaj cirkuleroj kaj kiujn ni resume redonas por pli oportuna informiĝo, aldonante la nomon de la organizantoj resp. kunvenestroj kaj (en krampoj) la ĝisnunan nombron de la anoncintaj konferencanoj. Estas jenaj:

Blinduloj (93): Wilh. Reiner, direktoro de la Blind. Instituto, Kobergstr. 34.

Filatelistoj (54): Max Hönlgsberger, Albrecht-Dürer-Platz 6.

Juristoj (19): D-ro Heinrich Orihal, Fürtherstr. 2. **Komerclistoj** (115): Emil Muskat, Tucherstrasse 21. **Kuracistoj** (23): D-rino Eugenie Steckelmacher, Spittlerortgraben.

Laboristoj (70): Georg Gerber, Allersbergerstrasse 57/III.

Scienculoj (61): D-ro Otto Kleider, Kaiserstr. 7. **Internacia Esp. Ligo de Liberpensuloj kaj Monistoj** (42): Kurt Hubricht, Leipzig-Neustadt, Mariannenstr. 30.

Teozofia Esp. Ligo (20): F-ino Maria van Rees, ĉefsekretariino, Wilderswill, Chatet Bertha, Svislando.

Asocio de Junaj Germanaj Esperantistoj (20): Erich Habellok, Breslau, Schlegelmacherstr. 19. **Kristana Esperantista Ligo** (10): Paul Hubner, Quedlinburg, Bergstrasse 1a.

„Konkordo“ (22): Edvardo Wiesenfeld, Warszawa, Biala 3.

Aŭstruja Esp. Delegitaro: Centra Oficejo, Wien, Mollardgasse 55.

Psikistoj (5): Direktoro L. Gube, Berlin-Friedenau, Fregstrasse 26.

Studado de naciaj lingvoj (4): Johann Jungfer, Lübben N. L., Lindenstrasse.

Univ. Esp. Asocio Junulara (15): Aleks. Hirsemann, Breslau, Herzogstr. 35.

Vegetara Ligo Esperantista (45): Oskar Blümmann, Hamburg-Fuhlsbüttel, Alsterkrugchaussée 568.

Katolikoj (55): J. Stahl, Jakobsplatz 17/II.

Int. Ligo de Esp. Poŝtistoj (Ilepo) (50): sup. reg. konsilisto O. Reber, Bamberg.

Franka Esp. Ligo: Adr. la sama.

Framasonoj (15): C. Barthel, Frankfurt a. Main, Wöhlerstrasse 14.

Kursvidantoj (10): Emil Kreibich, Kladno, zelezarny.

Instruistoj (180): Hans Kaupper, Nürnberg, Parkstrasse 13.

Eksmilitistoj (12): Karl Dörfler, Muhlendorf a. Inn, Siedelungswerk.

Fervojistoj (40): Sekretario O. Schlicht, Esperanto Nürnberg.

Virinoj (19): S-ino Signe Wollter Pfister, Baderstrasse 17.

Oficistoj (12): S-o A. Oberrotman, del. de UEA, Warszawa.

Krom ĉi tiuj 27 kunsidoj, laŭ alĝitaj notoj, estas intereso por fakkunsidoj, kiuj ne trovis ĝis nun kunvenestrojn: pacifistoj (34), inĝenieroj (15), abstinenculoj (10), bankoflistoj (10), hebreoj (10), ĵurnalistoj (10), policistoj (8), sportistoj (8), bontemplanoj (5), foto-amatoroj (5), krom tio kooperativanoj, kolektantoj, literaturistoj, maristoj, matematikistoj, malgrandnacianoj, metalindustriistoj, militrifuzantoj, muzikistoj, okulistoj, A. J. G. E., ekzamenantoj, Esp. Lit. Asocio, Edukista Internacio, ĝajmuloj, kemistoj, profesia konsilado, sobruoj, skoltoj, ŝakludantoj.

Efektive impona listo, kiu trafe ilustras la spiritan vigelecon en Esperantujo, kie ĉiu grava movado estas reprezentata. Sufiĉe da alskribaj pruvoj, kiom serioza estas ofte la intereso por la rilataj kunsidoj, kiom intensaj la klopodoj igi ilin kiel eble plej fruktodonaĵ.

Pro tio la L. K. K. konsideras honora tasko, speciale atenti ĉi tiun parton en la kongresprogramo kaj siaflanke laŭforte kontribui al bona sukceso. Unue per elekto kaj rezervigo de taŭgaj kaj indaj ejoj. La plejmulto da kunsidoj okazos en la vasta konstruaĵo de la Komerca Alternejo, kiun la Urbkonsilantaro mem preteme proponis por ĉi ĉi celo. Kelkajn fakkunsidojn ni lokumos kvazaŭ en propra hejmo, ekz. la komercistojn kaj reprezentantojn de foiroj en la fama Nürnberga Komerca Ĉambro, kies estraro de ĉiam simpatias pri Esperanto kaj disponigis la belegan festalonon; la blindulojn en la Blindula Instituto; la juristojn en la Distrikta Juĝejo; la fervojistojn kaj poŝtistojn en la rilataj ŝtataj oficejoj; la delegitaron de UEA en apuda salono de la kongresejo. Due per fiksado de oportuna tempo, por eviti kolizojn de fakparencaj aranĝoj kaj ebligti tiamaniere al ĉiu kongresano partopreni kiel eble plej multajn kunsidojn. Por ĉi tiu celo ni publikigos nian provizoran kongresprogramon en venonta numero de ET, submetante ĝin al la ĝenerala studado kaj petante eventualajn sugestojn por kontentigi fine la plurmilan kongresanaron.

Oka sceno.

Samaj personoj. Serĝento Huberto.

Serĝento Huberto (*rapide eniras tra la maldekstra pordo en la fundo kaj ekhaltas post la pordo, kiun li tuj fermas, nervoze*). Ĉu ili estas for?

Serĝento Petli. He, Huberto! Ĉu vi resaniĝis?

Serĝento Huberto. Ili estas jam sur la korto? Kiu horo estas?

Serĝento Petli (*rigardas la poŝhorloĝon*). Ankoraŭ tri minutoj. (*Montras fingre la benkon.*) Sidiĝu, kaj vi povos vidi ĉion.

Serĝento Huberto. Mi ne venis por vidi ĝin.

Serĝento Petli. Kial do vi venis?

Serĝento Huberto. Por enterigi lin.

Serĝento Petli (*rigardante refoje la poŝhorloĝon*). Ankoraŭ du minutoj.

Serĝento Huberto (*apogas, turnante sin, la kubulojn kontraŭ la pordo kaj kaŝas la vizaĝon en la manojn*).

(*Unu el la soldatoj antaŭ la ripozejo kovras siajn orelojn, la aliaj rigardas terurite antaŭ sin.*)

Serĝento Petli. Ankoraŭ unu minuto! Rigardu, kaporalo, kiel rekte li staras! Li tamen estas pli kuraĝa ol mi supozis. Ordinare la forkurintoj estas malkuraĝuloj. Ankoraŭ duona minuto! Klajn malsaĝajn respondojn li donis! — Jen ili celas! Jen vi havos!

(*Oni aŭdas salvon. La kvara soldato ĉe la fenestro forkuras terurite al la ripozejo.*)

Serĝento Petli. Transportita! (*Frapas per la pugno sur la tablon; poste li kaj la kaporalo subite ekstaras kaj rigardas eksteren.*)

La kurleno falas rapide.

(Daŭrigota.)

Sed ankaŭ la partoprenantoj en la fakkunsidoj devas kunhelpi al prosperado. Por eviti diletantan senfruktan babiladon kaj certigi seziozan traktadon, ni ne translasu niajn aranĝojn al la hazardo. Pro tio la L. K. K. nepre postulas, ke la kunsidoj bazu sur certa plano, alivorte ke oni ensendu minimume ĝis la 1. julio taŭgan, celkonscian kaj detalan programon pri referentaj kaj pritraktotaj temoj, kiun ni laŭeble multobligos kaj disdonos al la konferencanoj. La nombro de la partoprenantoj estu minimume 12 personoj. Alie la L. K. K. ne povos garantii konferencojn.

Estas certe ne oportunemo aŭ pedanteo de L. K. K., se ĝi faras tiun ĉi ŝajne rigoran postulon, sed la sincera klopodo koncentrigi la fortojn kaj certigi bonan sukceson.

D-ro Richard Ledermann,
Prez. de L. K. K.

Malbona taktiko.

Aperis nova Esp. gazeto: „Bulteno Germanlanda“, informilo pri historio, politiko kaj ekonomio, kiel diras la titolo. Eldonanto estas „Germana Esperanto Servo“ (kiuj personoj sin kaŝas post tiu firmo?) kaj redaktoro s-o Arnold Behrendt. Laŭ aspekto kaj enhavo la gazeto estas daŭraĵo de la fama „Informa Bulteno“, aperinta dum la mondilito. La aranĝo estas plaĉa, la preso klara, la stilo bona. Enhavo (teksto kaj ilustraĵoj) de la unua numero temas pri la Ruhr-konflikto kaj estas unu sola akuzego kontraŭ la franca nacio.

Nentel tuŝante la demandon, ĉu la agoj de la francoj kaj belgoj en la Ruhr-distrikto kaj en la cetera de ili okupita teritorio estas jes- aŭ ne- probable, ni deziras nur esprimi nian malkaŝan opinion, ke la eldono de tia bulteno en la nuna tempo, ĝuste antaŭ la kongreso de Nürnberg, estas tre malbona taktiko. La redaktoro mem opinias necese kvazaŭ-senkulpigi sin pro la eldono de la bulteno, rilatigante al la deklaro de Boulogne, laŭ kiu „Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas“. Efektive, ĉiu persono, eĉ uzanta Esperanton por malbona celo, estas „Esperantisto“; sed ĉu tian homon ni nomus samideano?

Esperable la eksterlandaj aliĝintoj ne lasos influ sin per la maldaŭga taktiko de kelkaj anonimuloj, resti for de la kongreso. Multmilope vi venu al Nürnberg! Vi estos bonvenaj. Pruvi al la mondo, ke — malgraŭ ĉiuj naciaj malamikaĵoj — la veraj Esperantistoj ne perdis sian noblan supernacian vidpunkton! Germanoj, britoj, francoj, nord- kaj sudlandanoj, okcidentuloj kaj orientuloj en Nürnberg senmalice etendos la manon unu al alia, konsciaj ke super ĉiuj nacioj lumas la stelo de vera homeco. La aliaj tamen, kiuj nepre ne povas silenti pri siaj naciaj specialintereso, eĉ kiam la nura taktiko tion postulas, forrestu de nia Mondfesto, kiu esence estas festo internacia, festo de pacemo kaj interkomprenemo. Ili nur ĝenuis la belan harmonion.

Grava laboro en Wien. Grandaj taskoj por niaj komercistoj Esperantistaj.

Ĉu la poresperanta laboro en komercistaj rondoj komencis ĉiuloke?

En Wien la rondoj, kompetentaj je aferoj mondkomercaj kaj interkomunikaj, komencis la laboron tuj post la Internacia Konferenco en Venezia.

La Wien'a delegito por Venezia unue raportis en kunveno de la Esp. Delegitaro en Wien. Sekvis pritrakto en speciala komerca rondo Esperantista kaj parolado en Esp. societo. Samtempe malloĝaj raportoj estis dissenditaj al gazetoj, gravaj oficejoj kaj organizoj, komercaj entreprenoj, tur-

ismaj rondoj k. c.; post tio eliris invitoj per la „Asocio por komercio kaj helpingo tutmondaj en Wien“ por pli granda kunveno, kiu merkrede, la 16. 5., okazis en la festsalono de la Foire-palaco.

Proksimume 80 reprezentantoj de ministroj, de ŝtatoj oficejoj, korporacioj kaj societoj komercaj, de la Wiener Internacia Foire, de turismaj societoj kaj de grandaj firmoj en Wien kune kun la prezidantoj de la plej gravaj Wien'aj unuigoj Esperantistaj kunvenis por pritrakti la rezolucion deciditan de la Internacia Konferenco en Venezia laŭ la propono de la Komerca Ĉambro en Paris, kiu postulas la ĝeneralan enkondukon de Esperanto.

La kunvenestro, s-o Karl Otto SIKOR, priparolis la celojn de la invitinta asocio, akcentis la grandan valoron de mondhelpingo por praktikaj komercistoj kaj montris eblajn vojojn, laŭ kiuj la enlanda komercistaro povus utiligi la avantaĝojn de ĉi tiu interkompreniĝo.

Pri la konferenco en Venezia referis la delegito, s-o prokuristo Franz J. Schade. Ĉi-okaze li povis uzati la oficialan raporton senditan de la aŭstra konsulo en Venezia, s-o registara konsilisto A. M. Poppauer, al la Ministro por Eksterlandaj Aferoj, kiu permesis la publikan uzon de ĉi tiu dokumento. Konsulo r.k. Poppauer, skeptikulo kaj eĉ kontraŭulo de ideo mondhelpinga, partopreninta al la konferenco nur pro speciala komiso por la aŭstra Ministro por Eksterlandaj Aferoj kaj per la Wiener Internacia Foire, jam post la unua kunsido estis konvertita, ĉar la viva, parolata vorto, la flua parolado de anoj el pli ol 20 nacioj en unu sola lingvo, estis klare pruvinta al li la bonegan uzoblon de Esperanto kiel internacian komercan lingvon; la konsulo finis sian oficialan raporton rekomendante al la aŭstra registaro kiel ankaŭ al la Wiener Internacia Foire estonte ne preterlasi Esperanto-kongreson aŭ konferencon sen delegi Esperantilingvosperantan reprezentanton.

Fine paroladis s-o Otto Simon, L. K., profesoro de la Nova Komercakademio Wien, pri: „Esperanto kaj la komercista idaro.“ Laŭ vidpunktoj praktika kiel ankaŭ pedagogia li parolis pri la valoro kaj la graveco de Esperanto por la junaj komercistoj, kaj liaj elokventaj klarigoj trovis la meritan riĉan aplaudon.

La ĉeestintoj akceptis ĉiuvoĉe la jenan rezolucion:

La kunvenintoj atendas, ke la kompetentaj oficejoj ŝtataj, korporacioj, entreprenoj, senescepte ĉiuj rondoj interesataj je la evoluo de komercio kaj industrio kaj de povofremdulaj aferoj en Aŭstrujo, decideme kaj urĝe entreprenu ĉiujn taŭgajn preporojn por plena eluzo de Esperanto por la internaciaj rilatoj je la bono de la ekonomio aŭstruja.

Per la centrejo de la Wien'aj Esp. unuigoj kaj poste per la Asocio por Komercio kaj Helpingo Tutmondaj en Wien ricevis la aŭstraj ĵurnaloj raportojn, kiujn ĝis nun 16 publikigis. Tuj post apero de la granda oficiala raporto germanlingva pri Venezia, ĝi estos dissendata al la plej gravaj komercaj institucioj kune kun specialaj leteroj kaj cirkuleroj. —

Ĉu en ĉiuj landoj kaj ĉefurboj merkataj oni similmaniere laboradas?

Ĉu estas preparata por komercistoj la eblo tuj aŭ dum la vintro lerni Esperanton?

Ĉu ekzistas ankaŭ instruantoj, taŭgaj por komercaj rondoj?

Ĉu la oficejoj kaj korporacioj komercaj estas provizitaj netrudeme kaj objektivite je faktoro en serioza kaj decema maniero, atestanta la taŭgecon de Esperanto por mondkomercio?

Ĉu en ĉiu granda urbo estas kreata Esp. centrejo gvidata de fidindaj komercistoj je dispono al la komercistaro por informoj, konsiloj, tradukoj, peradoj?

Literaturo.

Alessandro Manzoni.

Italujo festas la 50-an datrevenon de l' mortotago de unu el siaj plej eminentaj poetoj, kaj kun Italujo la tuta kulturmondo partoprenas en la memoro pri tiu viro, kies ĉefverkojn eĉ Goethe legis kun ravo kaj laŭdis kun entuziasmo.

Alessandro Manzoni, kiu mortis la 23-an de majo 1873 en Brusoglio ĉe Milano, naskiĝis en tiu ĉi belega ĉefurbo lombarda la 7-an de marto 1785. Li do atingis aĝon de 88 jaroj.

Alessandro Manzoni apartenas al la malmultaj poetoj, kies verkoj fariĝis parto de la mond-literaturo. La kosmopolitajn ideojn, kiujn li ŝatis estante junulo, li poste forĵetis favore al nobla patriotismo. Li verkis por sia itala popolo. — Same, estinte liberpensulo, en matura aĝo li fariĝis religie, kredinde dank' al la influo de sia edzino Luiza Blondel. La unua frukto de tiu opiniŝanĝo estis la konata „Sanktaj Himnoj“ (1812—1822), imponaj lirikalaj poeziaĵoj por la gloro de l' grandaj kristanaj festoj. — Poste sekvis „Odo je la morto de Napoleono“ kaj du dramoj „Grafo Carmagnola“ kaj „Adelchi“. Ĉi tiuj dramoj estis epokfarantaj por la itala literaturo; speciale valoraj estas liaj lirikalaj horoj. Sed la plej grava verko de l' poeto, lia vera vivoverko, estas la romano „Promessi sponsi“ (= La gefianĉoj), eldonita unufoje en Livorno (1827). La ago okazos en la deksepa jarcento en la lombarda lando kaj priskribas en la kadro de la tiama historia epoko la travivaĵojn de du geamantoj, Renzo kaj Lucia, kies hejmloko estas vilaĝeto ĉe Como-Lago. La romano estas historie same vera, kiel ĝi estas plastika la priskribo de l' pejzaĝo kaj vivofidela en la karakteroj, nekom-

pareble desegnitaj, kiuj fariĝis proverbiaj. Krom tio la verko elspiras varman religiecon.

Per „La gefianĉoj“ Manzoni atingis la supron de sia gloro. Li diris per ĝi, kion li devis diri. Lia plej forta verko estis ankaŭ lia lasta poezia. La reston de sia vivo li pasigis trankvile najbare de Milano. Li ne serĉis la favoron de l' popolo, sed ĝi serĉis lin. La ŝtato lin distingis farante lin senatoro; la urbo Romo lin nomis sia honora burĝo. Lian morton fundebriis la tuta Italujo. Liaj verkoj ĉiam denove eldoniĝis kaj filologoj kaj literaturhistoriistoj ilin pritraktis per granda nombro de indaj publikigaĵoj.

Tre dezirinde estus, ke la plej eminentaj verkoj de tiu poeto aperu en Esperanta traduko. Jen alloga kaj dankinda tasko de niaj itala samideanoj, per kio ili honorus plej bone sian grandan poeton.

Faŭst.

(3-a daŭrigo.)

La sceno en la studĉambro estas la plej impona, bela kaj profunda en la unua parto de l' dramo. Trifoj Faŭst frapis al la pordo, ĝis kiam ĝi estis malfermata. Ĉe la unua frapado ekaperis la terspirito, kiun li ne povis kompreni. Li frapas ree kaj ree. Nur nun la pudelo demetas la maskon, kaj aperas la malbona spirito alportanta la solvon de viveniĝo. — Finante sian monologon Faŭst konkludas jene:

Spirit' min helpas! Ekvidiĝas klaro,
Mi akribas sen tim': Komence estis faro!

Li nun scias, ke ni ne ĉerpu la vivon el libroj, sed el la vivo mem. La titanismo de Faŭst volas atingi la plej altan pinton de l' estado. Malfoste ne toleras tion; ĉiurimede li logante retenas la alien flugantan homon. Simbolo estas la persono de l' malbono; ĝi nur estas dua animo de Faŭst, de ĉiu homo. (Faŭst: Animojn du en brust', ha! tenas mi, ...) La homo aspiras la lumon, sed la spirito de l' malbono, la plej granda malamiko de la lumo, klopodas neniiĝi, forigi ĉiun lumeron en la animo de ĉiu kreitaĵo. Germoportaj estas nur la elementoj de l' akvo, aero kaj

Cu ĉiuloke oni atentis, ke la Venezia Konferenco devigas ĉiun komerciston Esperantistan kun plej streĉaj penadoj celi la efektivigon de almenaŭ la plej granda parto de la rezolucioj akceptitaj en Venezia?

Cu la komerca faka kunveno en Nürnberg posedos kaj montras sufiĉe taŭgan laborprogramon por la Esp. komercistaro?

La plej urgan laborordon ni tre bone konas nun. Ni ne esperu — ni laboru!

Franz I. Schade, Wien.

Pentekostaj kongresoj.

III-a Kongreso de Federacio de Revoluciemaj Esperantistoj Francilingvaj (belgoj, francoj, svisoj), 19.—20.—21. majo.

Tiu kongreso okazis ĉe la magistrato en St. Denis, apud Paris. Ĝi komenciĝis per propaganda kunveno, en kiu estis pritraktata de diversaj oratoroj la temo pri nepra neceseco de Esperanto por la laboristaro. Poste „Verd-katanoj“ prezentis teatraĵon: „La timo de l' batoj“; alia trupo ludis france komedieton de G. Courteline. Dum la paroladoj kelkaj idistoj provis sen sukcese ĝeni la kunvenon; ili estis energie silentigitaj kaj trafis nur malaprobegon de la tuta kunvenantaro.

Ceestis tiun kunvenegon ankaŭ kamaradoj Frenkel (hungaro) kaj Burda (ĉeĥo), kiuj alparolis la publikon en Esperanto.

46 kongresanoj reprezentis 18 grupojn. La debato okazis en paca kaj fratista atmosfero, kaj kelkaj gvidrezolucioj estis voĉdonataj, inter kiuj ni represas nur la ĉi-suban, kiu interesas la tutmondan laboristaron.

Viglan diskuton okazigis propono pri ŝanĝo de l' nomo de la Federacio. Pro taktika motivo, konsidero la reakcieman sintendon de s-o Léon Bérard al Esperanto, la ŝanĝo estis akceptata preskaŭ unuanime (du sinrenoj). De nun la nomo estas „Fédération Esperantiste Ouvrière“ (Esp. Federacio Laborista). Estis ankaŭ decidata la ŝanĝo de l' titolo de la federacia presorgano „L'Espérantiste Révolutionnaire“ je „L'Antinationaliste“ kaj ĝia ĉiumonata apero en franca lingvo komence de oktobro.

El la raportoj pri la movado plej menclindaj estas la rezultoj atingitaj per la „Koresponda Kurso“, kiun gvidas k-doj Robert (Paris) kaj Thévenet (Lyon).

Rezolucio.

La kongreso, konsiderante, 1. ke la poresperanta propagando tute ne sufiĉas por ke la Esp. movado povu firme stari kaj larĝe disvastiĝi; ĉar la novaj Esperantistoj facile forlasas niajn vicajn, se ili ne praktikas la lingvon; 2. ke estas do absolute necesa la ekzistado de organizaĵo celanta la praktikan utiligon de Esperanto;

3. ke jam ekzistas tiucela organizaĵo, nome Sennacieca Asocio Tutmonda;

Pro tiuj motivoj, ni varme rekomendas al ĉiuj anoj de la Federacio, ke ili aliĝu al S. A. T. kaj abonu ĝian organon „Sennacieca Revuo“.

La Franca Esp. Kongreso en Limoges 19.—22. majo.

Ĉi tiu kongreso estos fruktodona por la reorganizo de la Esp. movado en Francujo. Ĝin ceestis 80 delegitoj el ĉiuj partoj de la lando. La prezidanto de la Limoges-a grupo, s-o Lamant, kaj la sekr. s-ino Honorat, multe helpis al ĝia sukceso. Ĉiuj kunsidoj okazis en ejo de la Jura Lernejo, afable pruntedonita de ĝia direktoro.

La 19. vespere okazis propaganda parolado de Prof. Cart, dimanĉe la 20. matene kunveno de UEA, en kiu s-o Poncet, ĉefdel. por Sudorienta Francujo, prezentis raporton. Posttagmeze okazis kvinhora labora kunveno, en kiu oni

post varma diskuto starigis la novan organizon de S. F. P. E. laŭ lokaj grupoj kaj regionaj federacioj kaj elektis novan komitaton. Vespere en la Hotelo de la Paco okazis bankedo, kiun partoprenis s-o Betoulle, deputito kaj urbestro de Limoges, la du vicurbestroj s-oj Fèvre kaj Berland, s-oj Guimbelot, dir. de la Jura Lernejo, kaj Gallot, eksdeputito kaj urbestro de St. Sulpice. Sekvis koncerto kaj spektaklo kun partopreno de „Verda Kato“, sub lerta gvido de s-o Raymond Schwarz. La sekvintan tagon okazis ekskurso al Ax-sur-Vienne.

La XII-a Belga Kongreso Esperantista en Namur, 20.—21. majo 1923.

Malgraŭ ĉiuspecaj malfacilaĵoj kaj necertaĵoj pri la fervojaj komunikoj, pro la striko de la fervojistoj en Belgio, proksimume 180 gesamideanoj estis en Namur por ĉeesti sian dekan naciagan kongreson.

Dimanĉe, la 20-an, antaŭtagmeze, la kongresanoj estis korege akceptataj de la Urbestro kaj de la Festkomitato de Namur. Belegan paroladon faris francilingve s-o L. Cogen, vicprezidanto de Belga Ligo Esp.

La ĝenerala kunveno de la Belga Ligo okazis en la bela koncertejo de la Urbo teatro. Malferma parolado de s-o Cogen, raportoj de s-oj Petit kaj Mathieux, sekretario kaj kasisto. Por montri, ke Esperanto ankaŭ taŭgas plene por teknikaj aferoj, s-o Cogen klarigis mallonge la sistemon de la nova „Aŭtonoma Muzikskribo“ de Jean Hautstont. Li sukcesis igi tiun klarigon agrabla, eĉ por ne tre kontentaj ĉeestantoj.

Posttagmeze okazis bonege sukcesinta festeno kaj tramveturado al la fortikaĵo de Namur, kaj vespere ĉiuj kongresanoj sin retrovis en la „Kur-saal“, kie okazis belega koncerto, kaj kie, je ilia honoro, la direkto organizis poste dancadon.

Lunde, la 21-an, pli granda parto de la gesamideano partoprenis ekskurson al la mondfamaj grottoj de Han-sur-Lesse, dum alia parto ekskursis al la beleta urbeto Dinant.

Entute la kongreso estis vere agrabla, familia kunesito, pri kiu ĉiuj ĉeestintoj sendube konservos plej bonan impreson kaj memoron.

Dankon al la lokaj aranĝintoj f-ino Dorsinfang, f-ino Brosse, s-o Verbeke kaj leŭtenanto Remy!

Brabo.

Utopio.

Tiun vorton ni Esperantistoj aŭdas nevolonte, kaj nevolonte ni ankaŭ mem uzas ĝin koncerne aliajn homojn kaj ideojn. Metante ĝin tamen super artikolon en nia antaŭa numero, ni opinis havi por tio specialan kaŭzon. Kaj jam ni ricevis konfirmon al niaj supozoj. Samideano, ĉe kiu trapasis la mondmigraĵoj geamikoj kaj kiu ilin — pro samideaneco kaj bonkoreco — plej gastame subtenis, sendis al ni leteron, en kiu li esprimas la samajn dubojn, kiujn ni jam eldiris en nia antaŭa artikolo.

„Vojaĝante cele de propagando por ideala afero“, skribas la samideano, „oni devas plene scipovi la materion, por kiu oni volas propagandi. Sed s-o J. kaj f-ino S. ankoraŭ ne estas perfektaj Esperantistoj, sed nur lernantoj... Krome ambaŭ estas sen monrimedoj kaj volas tramigrigi la mondon je la kosto de Esperantistoj sur sia tuta vojo. Kaj tio hodiaŭ ne plu estas facila, ĉar ĉiu devas — en tiu ĉi malbona tempo — jam peni por subteni sin mem, kaj oni ne povas forjeti monon por tiaj senutilaj eksperimentoj... Ili (la geamikoj) diris, ke ilia vojaĝo daŭros nur, dum Esperantistoj finance subtenos ilin. Do mi tre timas, ke ili baldaŭ returniĝos, ĉar ĉirkaŭ la granda vasta mondo estas longa vojo, kaj ne ĉie ekzistas Esperantistoj, kiuj estas sufiĉe riĉaj por porti la koston de tiaj propagandistoj. Cetere mi opinias, ke la nomitoj ankaŭ fizike ne kapablas elteni la streĉegojn de mondvojaĝo.“

pekas. Ĉar la titanismo rajtas regi lin. Pro tio pereas la idilio kvazaŭ mortigita per la brulante detruanta tekaĵo de Nessus. Do la misihomo, la titano, pereigas ĉion, kion li ekprenas.

Jen la plej profunda percepto-kompreno de la Grenjo-tragedio. Ĝi ne estas mondo maledikita, sed mondo rigardata per okuloj de l' mondeno. — Brikkolore Goethe pentris scenojn en urbe, kie vivas revemal homoj ĉirkaŭataj per helaj vualoj de simpleco kaj trankvileco. Akompanate de l' tentanto Faŭst eniras la urbeton kaj renkontas Margareton (Grenjon) preterpasantan. Ĉie konataj estas la klasikaj versoj komence de la sceno:

Faŭsto. Fraŭlino bela, ĉu vi pardonas,
Se mi brakon por akompani proponas?
Margareto. Mi estas nek fraŭlin', nek bela,
Atingas hejmon sen help' iela. (Si liberigas sin kaj foriras.)

Faŭsto. Neniam vere tian belan
Infanon vidis mi anĝelan!
Modesta estas ŝi, virtema,
Kaj tamen iom ribelema.
Ne lipon ruĝan mi forgesos,
Nek vangan lumon, ĝis mondo ĉesos!

En la ĝardensceno la tragedio atingas la kulminacion; ĝi estas unu el la plej belaj lirikaĵoj perloj de germana poeziaro. Pura, ĉastia, iom post iom pli foriganta amo ornamas Margareton. Kvazaŭ ekfloranta burĝono la amo de Margaret ekstarigas la volupteman Faŭston. Trifioje la luna paro preterpasas la okulojn de l' leganto. Per ne imitebla ĉarmo Goethe disvolvigas la agadon, majstra psikologiaj, kaj finas ĝin per unu sola feliciĝa momento, kiun Margaret travivas, sekvata de la tragiko. Kiel kulison Goethe uzas tre groteskan fonon: malnoblan, senhontan kaj maldedcan ĉivirion (Maria), kiun eĉ Meŭsto abomenas. Ambaŭ bildoj donas al la sceno tre karakterizan aspekton.

Max Butlin.

(Daŭrigota.)

Humoro.

Duonklara virino iris butikon:
„Mi petas botelon da majolika rumo.“
„Eble jamelkan vi deziras, sinjorino“ rediras la komizo.
„Jes, jes, jamelkan; ĉi tiujn du vortojn konstante mi interkompromiti!“

Komerco.

Jugo de kompetentulo.

S-o Gérard, urbestro de Dijon, kiu antaŭ nelonge revenis de propaganda vojaĝo por disvastigo de franca komerco en skandinavaĵ landoj, skribis al s-o Poncet en Lyon (laŭ „Le Petit Parisien“ de 22. aprilo):

„La utileco de Esperanto ne povas esti neigata por disvastigi eksterlande francajn ideojn kaj, kun ili, la riĉajn produktojn de nia grundo, de nia komerco kaj de nia industrio.“

Foiro de Orléans.

Sur ĉiuj aŭtoj de la Regiona Foiro-Ekspozicio de Orléans (Francujo) estas presita: „Oni korespondas en Esperanto“. La Foiro okazos en junio. Esp. stando estas senpage disponigita al la grupo de Orléans.

Mallongaj Esp. Scilgoj.

Britujo.

London. „Dimanĉa Rondo“ faris diversajn vagadojn dimanĉon antaŭpenekostan ĉirkaŭ Caterham kaj lundon penekostan de Richmond al Windsor laŭ la bordo de rivero Tamezo (80 mejloj); gvidis f-ino Langellaan; ĉefaj nutraĵoj estis bananoj kaj rositaj akridoj.
— The Workers Travel Association (Lab. Turisma Asocio), Toynbee Hall, 28. Commercial Str., London E. 1, havas stampon sur siaj presaĵoj, ke ĝi korespondas per Esperanto.

Bulgarujo.

Kemanciar (regiono Deli-Oromano). Ekzistas grupo „Progreso“ sub prezido de Sp. Dobrev. Fondiĝis nova junula grupo. S-o Dobrev estas Esp. lektoro ĉe la reala lernejo.

Ĉeĥoslovakujo.

Přerov. Antaŭ unu jaro ne ekzistis ĉi tie Esp. movado. La nuna prez. de la societo, s-o Malik, aranĝis prop. paroladon kaj kurson, kiun baldaŭ sekvis dua kurso kaj fondo de societo, kiu nun havas 60 membrojn. Por aŭtuno la societo preparas grandan propr. feston kun ekspozicio. Adreso de la sekr.: Ed. Jallouhal, Přerov, Cechova 10.

La Ostrava Karavano al Nederlando, okazinta penekoste kaj gvidita de s-o Arno Janečka, del. UEA en Vitkovice (Moravio), bone sukcesis; la indiferecetoj el rondoj de instruitaro (partoprenis 16 geinstruitoj inter 82) nun estas konvinkitaj pri la taŭgeco de Esperanto. S-o J. petas nin, en la nomo de la tuta partoprenintaro, esprimi koregan dankon al ĉiuj helpintoj. — S-o J. malfermis kafeton „Esperanto“ en Vitkovice, Republ. S-o.

Francujo.

Nova aserto de Ministro Bérard, jam refutita per mil faktoj.

„Le Temps“ de 17. majo repreas duan respondon de Ministro Bérard al la vicprezidanto de Franca Ligo de Homaj Rajtoj, en kiu li diras, ke Esperanto estas kontraŭa al la laŭna idealo kaj ne povas esti komprenata de diverslingvanoj. Jen la aserto de la Ministro: Ĉiuj lingvistoj konsentas pri la fakto ke fonetikaj kutimoj respektivaj de popoloj faras tre rapide nekomprenbla ĉi tiun internacian lingvon pro spontanaĵ alformigoj, kiun ĉi raso donas al ĝi (en raison des altérations spontanées que chaque race lui ferait subir)“.

Hispanujo.

Vich. Grupo „Vika Esperantistaro“ vigligita, pro deĉido, ke XI-a Kongreso de Kaj. Esp. Fed. kaj X-aj Int. Firaĵoj okazu en Vich. Kurso komenciĝis. Aliaj kursoj projektataj ĉe Centre Obrero (lab. societo) kaj por fraŭlinoj. Kunvenoj bone vizitataj. (I. C.)

Italujo.

Bolzano (Bozen). La 18. 5. okazis kunveno de la Esperantistoj de regiono „Venetia Tridentina“. Partoprenis s-anoj el Brentonico, Bressanone, Malabassa, Merano, Rovereto kaj Trento.

Nederlando.

Nova katolika grupo.

La konsulo de IKUE en Eindhoven scilgas, ke tie la 30. 5. fondiĝis Eindh. R. K. Esp. Unuigo por virinoj. „La aŭda kruco“, kiu apartenas al Nederl. R. K. Esp. Ligo „Nederlanda Katoliko“.

Rumanlando.

Bucuresti. — Nova kurso kun 66 partoprenantoj malfermiĝis la 12. 5. en la Universitato Popola. Instruas pastro A. Ce.

Timisoara. — La 13. 5. okazis nova Esp. ekzameno de 15 kuraŭloj instruitaj de s-o F. Hügel, videl de UEA. Precipe sin distingis per deklamo Otto Scholbert. 12-jara knabo, kaj f-ino Ilono Rössler. Post la ekzameno la gvidinto impresigis parolis pri la Esp. ideo. laŭ la biblia frazo: „Amu vian proklamilon kiel vin mem!“ En la nomo de la lernintoj f-ino Rössler transdonis al s-o Hügel florkronon. Posttagmeze oni ekskuris al proklama ĉasbarbo.

Resuma raportoj el Ruslando.

Raportoj kaj lekcionoj.

Moskva. 12. 2. 1923 okazis raportoj de k-ado Javoronkov en la Agrikultura Akademio Petrovskaja pri „Esp kaj la Agrikultura Ekspozicio“, okazonta dum aŭg.—sept. nj. en Moskva.

28. 5. en la granda salono de Agrikultura Akademio Petrovskaja estis raportoj pri la sama ekspozicio. Partoprenis: s-o Lebedev, gvidanto de redakcia-eldona fakto de l' ekspozicio, s-o Anioloviĉ, gvidanto de ekstenda fakto de l' ekspozicio kaj membro de Centra Komitato de SEU, s-ano Javoronkov, kiu raportis pri alprenado de Esp. dum internacaj ekspozicioj, fojroj eksterlande kaj pri la eblico organizi taĉmenton da „gvidantoj“ por la okazonta ekspozicio. La raportoj rezultigis, ke 180 personoj sin enakribis por elerni Esperanton.

29. 5. laŭ iniciato de Profsekcio en Instituto de Interligado je nomo de Podbelskij estis legata raportoj je temo: „Aktuala utiligo de Esp. dum radiotelefonaj interrilatoj kun eksterlando“. Rezulte akceptita rezolucio pri organizo de Esp. kurso ĉe l' Instituto.

Vitebsk. S-ano Šaber legas lekcionojn pri Esp. en la klubo de Ekonomio. Oni aranĝas diskuton de l' lekcionoj, kiujn partoprenas publiko, kaj la nombro de interesiĝintoj ĉiam pligrandiĝas.

Kiev. 8. 2. en Proletaria Muzeo estis aranĝita Esp. vesperfesto. Legita jenaj raportoj: s-ano Škabara „Lingvo por ĉiuj, ĝia fundamento, evoluo kaj signifo“, s-ano Polak „Esp. okcidente kaj en Rusio dum nuna tempo“, kaj s-ano Devjatnin „Tra Eŭropo per Esp.“ (personaj impresoj). Poste estis demonstrataj voĉaj kaj muzikaj numeroj en Esp.

Novorosijsk. Kubano Ĉernomorska gubernio. Estis legata raportoj pri Esp. de k-ado Konevskij en klubo je nomo de „Engela“; la raportoj havis grandan sukceson. Tiflis (Kartvelio). D-ro A. Fišer faris raporton pri Esp. dum Esp. ekspozicio en „Laborista Palaco“ kaj en la klubo de fervojistoj.

Esperantistaj rondetoj, sekcioj, grupoj.

Lebedjan, Tambova gub. Ĉe Laborista klubo sukcese laboras Esp. rondeto.

Tjumen (Siberio). En la klubo de profesiaj unuigoj estas formita sekcio por Esp. atudado.

Ŝadrinsk, Ekaterinburga gub. Organizita grupo de Esp., kiu troviĝas sub aŭdigo de Loka Fakto por Popol-klerigado; la lasta disponigis por la grupo klubojn.

Esperantistaj kursoj.

Astrahan. Esp. kurso funkcias ĉe profesia unuigo de Sviaj laborantoj kun 18 partoprenantoj.

Zajĉik (Astrov, Astrah. gub. La Esp. kurson partoprenas 80 lernintoj gvidanto s-ano Kalinin.

Vitebsk. Elementaj kursoj de Esp. finis 60 personoj. Komenciĝis panka kurso kun la sama kvanto da partoprenintoj. Sukcese funkcias nova elementa kurso.

Kemj (Karelia Labora Komunumo). Ĉe loka poŝtelgrafita kontoro vesperan Esp. kurson el 12 partoprenintoj gvidas la plenrajtigita de SEU.

Kineŝma, Ivanovo-Voznesenska gub. Kurso de Esp. ĉe klubo de riverŝipanoj; Esp. grupo bone sukcesas.

Kutais (Georgio). Kurso de Esp. organizita ĉe loka profunulo de sovjelaboristoj.

Malojaroslavec, Kaluga gub. Esp. kurson en Popola Domo Fervojista gvidas s-ano Stefan.

Nižnij-Novgorod. Esp. kurso funkcias ĉe Centra Laborista klubo je nomo de Svedlov kaj en Kavaleria Lernejo.

Saratov. De februaro nunjara funkcias vespera lernejo de Esp., permesita de Fakto de Profesia Klerigado. Kurso daŭras 3 monatojn.

Vil. Siĉevskoje, Altaja gub. Organizita Esp. kurso por 20 lernantoj de loka duagrada lernejo.

Ŝostka, Cernigov gub. En la loka Laborista klubo de Uzino k-ado Zajkovskij gvidas kurson.

Vil. Su-Pos (Aŭtonomia Ĉuvaŝa Regiono). Esp. kurson partoprenas 8 personoj.

Esperanto en lernejoj.

Moskva. Esp. instruata: ĉe Petrovskaja Agrikultura Akademio, ĉe Praktika Instituto de Inĝenieroj-Konstruistoj kaj ĉe Instituto de Interligado je nomo de k-ado Podbelskij.

Briansk. Ĉe Brianska Praktika Instituto Esp. kurso gvidata de k-ado Tregubenko kaj Voloseviĉ.

Irkutsk. Instruado de Esp. enkondukita en la lernejon por plenajuloj je nomo de Karl Marx. Kiel gvidanto estas invitita privat-docento de Regna Universitato, s-o Rukavcin. Nombro de lernantoj nun estas 40, ĝenerala nombro de lernintoj superas milon da personoj.

Malojaroslavec, Kaluga gub. Kurso gvidata en loka Teknikumo.

Minsk. Ĉe Minska Belorusia Regna Universitato estas organizita rondeto de Esp. studentoj. Kurso funkcias por 30 personoj. En la prezidantaro de l' rondeto laboras s-oj Snejko kaj Rehler. Reprezentantoj de l' fakultatoj estas: por la medicina Baranovskij, por „FON“ Raginskij kaj pedagogia Gordon.

Nevjansk, Ekaterinburga gub. Estas organizita Esp. rondeto de lernantoj de loka duagrada lernejo el 16 personoj.

Rostov s. D. En Politeknika Instituto organizita Esp. grupo de 40 partoprenintoj.

Riĉĉevo, Saratova gub. Ĉe lernejo de politika klerigado funkcias kurso por 18 personoj.

Skopin, Rjazan' gub. 28. 2. okazis raportoj pri Esp. ĉe ĝenerala kunveno de lernantoj de duagrada lernejo, kiu rezultigis 400 enskribintojn por Esp. kurso.

Cardfuj (Buĥara). Ĉe loka lerneja klubo Esp. instruata por 50 lernantoj de duagrada lernejo.

(Laŭ oficialaj scilgoj de Sovetlanda Esp. Servo el n-o 5 de „Bulteno de CK. SEU.)

Grava rabato je Dumviva Abono.

Denove la germana valuto falegis, kaj denove nun estas en Germanlando okazo por favore aĉeti diversajn materialojn. Tial ni donos gravan rabaton je Dumviva Abono, kiuj estos pagitaj ĝis fino de junio (el Usono ĝis 10. Julio).

La rabata tarifo por Dumviva Abono estas en la landoj: aŭstra 500000 kr., belga 200 fl., brita 3½ stierl. pd., bulgara 1000 levoj, ĉeĥoslovaka 350 kr., dana 85 kr., estona 3500 mk., finna 350 mk., franca 180 fl., germana egalvaloro de 40 sv. fl. laŭ la taga kurzo ĉe la pago, hispana 85 pes., hungara 35000 kr., itala 250 lir., jugoslava 1000 din., kanada 17 dol., latva 45 lat., litova 90 lit., nederlanda 40 guld., norvega 85 kr., pola 400000 mk., portugala 200 esk., rumana 1250 leoj, rusa 40 svls. fl. aŭ 8 dol., sveda 65 kr., svisa 85 fl., usona 17 dol.

Grupoj, kiuj pagos egalan sumon, ricevos ET dum 20 jaroj.

La monon oni pagu laŭ maniero montrita en la „Tarifo“ (vidu ET n-o 137); plej rekomendinda nuntempe estas pago laŭ maniero montrita sub cifero 2.

Ni atentigas, ke post 1. Julio la enhavo de ET denove plimultiĝos.

Leterkesto de ET.

La ĉefredaktoro atentigas, ke personajn korespondadojn de li oni bonvolu atendi ne antaŭ la fino de junio, ĉar li estas forvojaĝonta, i. a. al Nürnberg por preparoli kongresdemandojn.

Sp. D. en K. Dankon pro fotografajo kun ET-legantoj; ni konservos ĝin en nia albumo.

G. L. en Rigas. Vi eraras opininte ke grandskribado de vortoj en italoj estas speciale germana kulturo. Vi trovas ĝin en ĵurnaloj de preakaj ĉiuj popoloj, ekz. en (ni hazarde havas antaŭ ni): France-Eŭrope-Orient (franca), Daily Herald (angla), Jugoslavenkaj Narod (serba), Jornal do Commercio (portugala-brazilia), k. a.

A. J. en V. La multajn nomojn en via dankesprimio ni ne povis publikigi pro manko de loko ĉar ili ne interreas p. multon de ET-legantaro. Dankon pro raporteto.

AŬSTRALIO.

La Nova kaj Bela Mondo de la Sudo.

Survoje al la XV-a Universala Kongreso en Nürnberg, s-o W. J. Drummond (Prezidanto de la Esperanta klubo Melbourne, kaj samideano de 1908) feros paroladonj lumblinde ilustritajn pri la vastega kontinento de Aŭstralio, la sunbrila lando de progreso. Gruposekretarioj interesataj skribu tuj al: W. J. Drummond, British Esperanto Association, 17, Hart St., London.

Parolejo.

176. Ekskursoj en fremdlandon.

Praktika uzado de nia lingvo limiĝas ĉe multaj samideanoj, krom je legado de diversaj gazetoj kaj libroj, je interparolado kun samlingvuloj en klubo aŭ societo. Sed certe eksterordinaran impreson faras interparolado kun alilingvuloj, per kio estas ankaŭ antaŭgata la vera celo de internacia lingvo. Esperantistoj kun loka kleriga societo (M. O. L.) en St. Ostrava (Ĉeĥoslov. Silezio) intencas aranĝi ekskurson en Nederlando. Ilia interrilatiĝo kun ĉeĥoslov-

veka ambasadorelo en Haag promesas bonan prosperon de la afero. La ekskurso anoncis kelkaj naciaj gazetoj, kaj ĝi fariĝis efika propagandilo por nia afero, ĉar multaj personoj interesiĝintaj pri la ekskurso komencas lerni Esperanton. Ĉu ne utilas al nia afero, se ĉiuj naciaj asocioj entreprenus ĉiujare kelktagan kiel eble plej malmultekostan ekskurson en fremdlandoj?

Multaj gvidantoj de asocioj estas personoj influaj, kiuj povus peti de sia registaro, ke ĝi favorigu ekskurson per fervoja aŭ pasporta rabato. Okaze de reciproka ekskurso farus la samon la alia asocio ĉe sia registaro. Komunal antaŭprizorgitaj noktetoj kaj manĝaĵoj ankaŭ pli malkarigis la ekskursajn elspezojn. La ebleco je favoraj kondiĉoj viziti fremdlandon kaj praktike uz Esperanton kiel komprenilon kun ailingvuloj, certe pligrandigus la nombron de samideanoj.

Niaj tiumondaj kongresoj havas, krom propagando, ankoraŭ pli altajn celojn, kaj vizito al tiuj ne estas atingebla por ĉiuj-landanoj. La menciitaj ekskursoj estas celantaj instigi necesperantistojn al lernado de tiu lingvo por povi praktike uz ĝin okaze de ekskurso. Jen laborokampo por naciaj asocioj aŭ pli grandaj regionaj societoj, kies rezultatoj certe donos bonajn fruktojn. J.N., Lazy.

177.

En pasinta jaro s-o Ledermann aperigis artikolon en ET pri reciproka logigado inter Esperantistoj. Li rekomendis ET por tiaj ofertoj. Estus vere dezirinde, realigi la proponon inter pli grandaj rondoj. Josef Major.

Rim. de la red. Ĉar la propono ŝajnas al ni bona, ni volonte represas ĝin. Provizore ni povos represiti itajn anoncetojn sub speciala rubriko. Vidu la koncernan rubrikon.

178. Manko de Esp. literaturo en Ruslando.

Jam kelkfoje mi vidis en ET konsilon aĉeti kaj legi niajn klasikajn verketojn por akiri bonan stilon. Tiu ĉi konsilo estas plenumbla eĉ en la plej malbonvalutaj landoj de Okcidenta Eŭropo kaj tamen evidente estas ne plenumata. Ni, sovjellandaj Esperantistoj, soifas je Esperanta literaturo, ĉe ni mankas plej necesaj libroj, ni bonege konscias la necescon legi klasikulojn kaj tamen neniam maniere povas aĉeti literaturon. Ĉiuj provizoroj de literaturo disvendigis ankoraŭ en 1918-a jaro, kaj novan ni ne havas. Malofte vendataj libroj kostas preskaŭ sampezan kvanton da oro. Vere neniam homo bone iakasa la valoron de iloj, kien ili havas. Por mi strange estas legi alvokojn pri aĉeto de libroj Esperantaj; ĉe ni oni proponas la monon, sed libroj mankas; en eksterlando oni proponas librojn, sed aĉetantoj estas malmultegaj. Ĉu vi ne hontas? George N. Teterin, Fontanka 21, Petrograd.

Gazetaro.

New Jersey Post, 5. 5. Detala raporto pri Esp. movado en New York.

Gazeta de Noticias, 20. 4. kaj O Imparcial, 25. 4., ambaŭ en Rio de Janeiro. Kun ilustr. raportoj pri 7-a Brazila Esp. Kongreso.

Headway, organo de la brita unuigo per L. d. N., London, aprilo. En rubriko „The Book Counter“ mencio de raportoj de L. d. N. pri Esp.

The Open Road, London, majo. Organo de britaj skoltaj. Kun alvoko al la Esp. skoltaj. Adreso: Denton House, Vauxhall Bridge Road, London SW. 1.

Le Temps, Paris, 17. 5. Art. pri la demando de Esp. kun nova letero de Ministro Bérard al s-o Ferd. Busson.

France-Europe-Orient, Paris, 15. 5. Kun aldono en du lingvoj (franca kaj Esperanta paralele) de „Int. Esp. Kom. Oficejo“.

Reichenberger Zeitung, 6. 5. Pri ŝtata ekzameno en Esp. — 13. 5. Esp. kaj Int. Lab. Of.

Ostrauer Zeitung, 1. 5. kaj 25. 5. Esp. anguloj (aperos de nun ĉiumerkredo).

Zenit, Zagreb, majo. Sciligas pri a. t. de L. Micic en ET pri C. Veldi.

Jutarnji List, 20. 5. Detala art. pri prepa. o. j. por la unua nacia Esp. kongreso en Jugoslavio okazonta en Zagreb la 29-31. 7.

Die Neue Zeitung, Wien, 20. 4. kaj 28. 4. Venezia. — 29. 4. Esp. kaj folioj. — 12. 5. Aŭstria Kat Ligo Esp. — 19. 5. Aŭstria Kat. Ligo; raportoj pri kunveno de societo por mondkomerc kaj mond ingvo.

Diarlo de Noticias, Lisboa, 4. 5. Pri Venezia.

Imprensa Nova, Lisboa, 1. 5. Pri Venezia.

Hudkavalls Nyheter, 19. 5. Esp. kiel praktika komerca kaj turisma lingvo. — 25. 5. Tri art. de Esp. Preas.

Laiwias Serge, Rige, 18. 5. Rezolucioj de Venezia. — 24. 5. Art. pri Esp.

Latvis, Riga, 24. 5. Art. pri Esp.

Ricevitaj gazetoj sen mencio pri Esperanto.

Der Bund, Frankfurt, 19. 5.

Carlitas, Freiburg, marto-aprilo.

Eugenia, Barcelona, majo.

L'Iride, Gravina, marto-aprilo.

Anoncetoj.

MORTO — La 9. majo mortis samideano Viktor Lichtenstein el Warszawa, vera Esperantisto de 1917, en aĝo de 24 jaroj. [1]

EDZIĜPROPONO. Teknika oficisto, 29-jara, longtalla, en memstara pozicio, sportano, serĉas maturan, belan vivakompasistino. Havajo ne tre grava. Oni bonvolu adreŝi detale, Esperante skribitajn leterojn kun fotografiaj (kiu estas resendota) al lia amiko Richard Schopp, tekn. oficisto en St. Pölten, Jahnsstr. 21 (Aŭst.). — Diskreteco! [2]

ADRESŜANĜO. — J. B. C. de Koster, (antaŭe en Amsterdam), nova adreso: Opleidings Comp-je Regiment Jagers Waalsdorp bij den Haag deziras interŝanĝi pm. kaj fotografiajn. [2]

PETRO STOJAN. LK. petas siajn korespondantojn ne plu adreŝi al li sendaĵojn en E. k. en la rusa, pro la milita stato de lia patrolando. Sendi lajn pm. adreŝi al lia patro G. Meazžini, San Giovanni Valdarno, Firenze, Italia. [2]

LA RAPORTO de la Ligo de Nacioj pri Esperanto kiel internacia lingvo en aĉeta traduko ricevebla ĉe Eldona Societo Esperanto en Stockholm 1, (Sved.) kontraŭ ensendo de 1 sv. fr. [2]

LEDO-POŝSPEGULOJ kaj novaj ost-ornamaĵoj por sinjorinoj. Postulu specimenon kontraŭ 1 sv. fr. aŭ egalvaloro. Fervoral reprezentantoj serĉataj en ĉiuj landoj. Fermo Siegfried Baer en Rottb. b. Nürnberg. Postfak. 51. [2]

S-O P. MEDEM, Kaunas (Litovujo) forveturinte petas prokrasti korespondadon ĝis post la XV-a. [1]

„VENDREDA KLUBO“ kunvenas en Köln, restoracio de „Schauspielhaus“ ĉiun vendredon vespere je la 8-a kaj invitas je vizito ĉiujn samideanojn. Oni parolas nur Esp. [1]

GLUMARKOJ pri la konferenco en Venezia. 100 por 1 sv. fr. aŭ 2 fr. fr. aŭ 2 lit. aŭ egalvaloro. Pri la foiro de Budapeŝt por duono de la nomita prezoj. — P. Balkanyi, Budapest, VI. (Hung.) Hajos-u. 15. [1]

ESTINTA MILITAROPLANISTO Jurij Andrejeviĉ Andrejev (ruso) estas serĉata de siaj gepatroj. Sciigojn bonvolu sendi al lia patro A. Andrejev, 156 Nikolajevskaja, en Tiflis, Kaŭkazo. [1]

FILATELISTOJ! Kiu sendas al mi 100—1000 poŝmarkojn alilandajn nedifektajn, ricevas saman kvanton de Hispanujo laŭ lvert 1925. Gabriel Alomar, Prez. de EKP, str. Vallori 14 en Palma de Mallorca (Hisp.) [9]

Kamaradoj-Gravuristoj de Japanujo.

Vi povas fari al ni altvaloran komplezon, se vi sendas al ni japanan paperon por presado de gravuraĵoj, specimenojn de originalaĵoj de aktuala antikva kaj japana gravuraĵoj.

Al ni, studentoj de l' supera Arternejo en ĝia grafika fakultato precipe, estas necese konatiĝi kun via gravurarto kies p'el talentaj artistoj ni konsideras vin.

Ni estus ĝojaj ekinterrilati kun vi, reciproke konatiĝante kun la gravurarto, ĝia historio, metodoj de instruo, — interŝanĝante la gravuraĵojn! Ni esperas ricevi vian konsenton kaj jam kolektas materialon por interŝanĝo, kiun ni sendos al vi tuj post la ricevo de via konsento.

Komence, de nia flanko, ni povos proponi gravuraĵojn „ex libris-ojn“, kolektojn de grafiko, laborojn de niaj studentoj, profesoroj kaj de aliaj reprezentantoj de gravurarto, La poŝtelspezoj estos pagataj de ni.

Prezidanto de Ekzektiva Studenta Komitato de Superaĵ Regnaj Art-Teknikaj Laboroj.

Nikolao Lapin, Rusio, Moskvo, Miasnickaja, 21, kv. 45.

ALBANIO

Broŝurforma prezo de interesa artikolo el „Internacia Komerc“ n-o 1. 16 paĝoj, kun du ilustraĵoj.

PREZO: bonvalutuloj 0.30 sv. fr., malbonvalutuloj 0.50 gmk. X ŝloalimbro, ET-abonantoj la prezo de unu ET-numero (pagon ni prenos laŭ dezire de la abonkonto).

Eldonejo „Esperanto Triumfonta“ (T. & H. Jung), Horrem b. Köln.

Ni liveras nur librojn de ni mem eldonitajn. Pro aliaj verkoj al ni turni al Bultin & Jung en Godesberg, Germ.

Al la Esperantistoj en Pola Lando.

Dezirante helpi al la vigligo de la tutlanda Esp. movado kaj samtempe montri al unuopuloj-Esperantistoj la volon, kien direktiĝi en okazo de intencita ekpropagando en koncerna loko. — „Pola Esp. Servo“ arangos laŭ deziro:

- publikajn propagand-paroladon,
- elementajn kursojn, sendante specialan kursgvidanton, en okazo, ke mankos en la loko lerta kursgvidanto,
- Esp. ekspoziciojn: la materialon por tiu celo oni ricevos senpaga ludonita por anstataŭo de la sendkostoj kaj garantiu skriba, ke oni ĉion bone resendos al la pruntekoncinto tuj post fino de l' ekspozicio. — Anonco pri dezirita pruntepreno necesa 4 semajnojn antaŭe.
- tutpollandan skriba kurso, kiun ĉiu senescepte povas partopreni.

Demandu ĉiujn pluajn kondiĉojn! Samideanoj en Pola lando subvenu nian bonan intencon kaj volon!

Postulu la jus aperintan senpagan Esp. katalogon n-o 2, ensendante por sendkostoj letere (nuntempe) 500 mk. eksterlandanoj 1 resp. kup.

Pola Esperanto Servo (Gvid. Pr. Prengel), Bydgoszcz, Dluga 1.

Ĉu vi jam posedas la klasikajn verkojn?

Goethe, Hermano kaj Doroteo, gmk. 1.20 X ŝloalim., sv. fr. 1.20 por bonvalutuloj.

Lessing, Minna von Barnhelm, gmk. 0.80 X ŝloalim., sv. fr. 0.80 por bonvalutuloj.

Raabe, La nigra galero, gmk. 1.20 X ŝloalim., sv. fr. 1.20 por bonvalutuloj.

Seldel, Vintro-Fabeloj, gmk. 1.50 X ŝloalim., sv. fr. 1.50 por bonvalutuloj.

Avsejkeno, Fraŭlino Suzano, gmk. 0.90 X ŝloalim., sv. fr. 0.90 por bonvalutuloj.

Por sendkostoj oni aldonas 10 procentojn al la supre nomitaj prezoj.

Butin & Jung, Godesberg (Germanujo) Esperanto-Eldonejo, Bahnhofstr. 30, Poŝtbeke konto Köln 92036.

Pri la XV-a.

Litovaj samideanoj, geedzoj a-ino Mare kaj Liudas Aiseika, veturante al la XV-a, intencas vojaĝi tra Memel, Sietlin aŭ Lübeck, Hamburg, Köln, partoprenos IREKO-n kaj post la XV-a vizitos München, Wien, Budapest, Praha, Dresden, Leipzig, Berlin kaj Königsberg. Ili petas tial ajn afablan samideanojn kiuj konsentas, dum ilia vojaĝo renkonti ilin kaj helpi ilian traveturadon, sciligi ilon laŭ adreso: Liudas Aiseika en Birzaj (Litovujo). [2]

Kiu donos al mi loĝojn dum la XV-a en Nürnberg, ricevos logejoj kaj estas gastigata ĉe ni en Budapest dum samloga tempo. Josef Malor, del. de UEA en Alzenburg, S.-A., Hempelstr. 44. [2]

Korespondado kaj Interŝanĝo.

F-o André Droste, Hugo de Grootstr. 34bis en Utrecht (Nederl.) deziras interŝanĝi vidadkartojn. Li resendas krom el Utrecht ankaŭ al aliaj urboj, ankaŭ laŭvole korespondas, sed petas legeblan skribaĵon. [2]

S-o Ivan G. Nikolov, fotografisto en Tirnovo (Bulg.) deziras korespondi per leteroj kaj pk. kun ĉiulandaj samprofesiajanoj pri klasika moderna fotografarto kaj interŝanĝi fotografiajn modelajn. Preferas Germanujo, Francujo, Britujo, Japanujo kaj Usono. [2]

Viktor Ruuse, S. Pärnu mut. 16—2 en Tallinn (Estl.) deziras korespondi per il. pk. kaj interŝanĝi monbiletojn. [2]

Kiu sendas al mi 50—100 sialandajn pm., ricevos saman kvanton mialandajn. S-o Reinhold Münnik, Narva mut. 39, kv. 6 en Jõhvi (Estl.). [2]

S-o A. Grimpel, en Narva (Estl.) Roheline t. 15—2 deziras interŝanĝi pm. kun la tuta mondo. [3]

Fraŭlino Dr. Lillo Egerer en Timișoara (Ruman.), IV., Strada Brailanu 12 deziras interŝanĝi il. pk. kun ĉiuj landoj, precipe ekster-eŭropaj. [2]

S-o Franz Vöelhaber, Wien, IX., van Svietsengasse 1, Aŭstrio, deziras korespondi pri interna koloniasocio, ĝardenkulturo, memhelpo kaj praktika idealismo, letere kaj bildpoŝtarte. [2]

S-o Stefan Viehauser, Wien, IX., Tendlergasse 8/28, Aŭstrio, deziras korespondi kun ĉiulandanoj preferante ekster-eŭropajn pri moroj, kulturoj kaj interesaj okazintaĵoj en ĉiuj landoj letere kaj bildpoŝtarte. [2]

Atentu! Mi serĉas interrilatojn kun Importistoj de vestaĵoj! kunlaboranto de unuaranga drapofabrikejo: Friedr. Petraschke, Kamenz, Sa., Germ.

Simon Taĝer & K-jo, Sofia, Bulg. komercado pogranda,

akceptas komercaĵojn komiste

Reprezentado de ĉiusepacaj artikoloj. Importo de bulgaraj produktaĵoj. Eksperto de reklamas diversajn patentojn, senpaga Informas ĉion koncerne niajn artikolojn.

Pruvoj instruas plej bone!

ke vi aĉetas bonstofajn pantolonajn ĉiusepacajn kip. plej profite ĉe mi.

Inter aliaj skribas s-o P. S. en Sheffield: „mi devas laŭdi vin pro la bona formo kaj la bona maniero, kiel vi faris la pantolonon...“

Simile esprimas sin ankaŭ aliaj klientoj.

Tial provu ankaŭ vi!

Facile komprenebla mezur-sistemo. Malaltaj prezoj. Baldaŭa livero. Eksperto ĉiulanden. Malkara sendkostoj. Ankaŭ vendado de ne prilaboritaj ŝtofoj. — Postulu detalan oferton kontraŭ poŝtmarkoj aŭ stampil. resp. kup. de

Joh. P. Schmidt, Zittau i./Sa. 85 (Germanl.)

Jus aperis nova rusa libro

La Kvinjaro de Sovetlandoj

Luksa eldono, havanta pli ol 80 paĝojn kun 70 ilustraĵoj.

La tuta profito de la eldono estas transdonata al la Tutruslanda Komisiono por likvido de malsatosekvoj.

Prezo: 2 sv. fr.

Bonvalutuloj kaj mezbonvalutuloj mendu ĉe ET, malbonvalutuloj ĉe k-o Rich. Lerchner, en Leipzig-Sib. Colmatr. I III.

Skriba kurso de Esperanto por komencantoj kaj progresintoj.

Ĉi, kiu volas perfektigi en lingvo internacia, havas okazon partopreni skriban kurson de Esperanto. La subskribinto korektas ĉiujn ekzercaĵojn, tradukaĵojn kaj leterojn Esperantajn, senditajn al li de kursanoj. Korektitajn ekzercaĵojn oni resendas al kursanoj kun apudaj rimarkoj en Esperanto. Ĉiu kursano havas rajton sendi 10 ekzercojn por korekto. Reala poŝtelspezojn pagas la subskribinto. Por fariĝi kursano, oni sendu rekomendite kun unua ekzerco 14 frankojn svisajn aŭ egalvaloron je la adreso:

Leopold Kronenberg, diplom. profesoro de Esperanto, (laŭ la „Profesora Diploma“ N-o 96 de „Internacia Instituto de Esperanto“, Genevo, 1912.) Bydgoszcz, Polujo.

P. S. Kursojto por poloj kune kun lernolibro „Samouczek“ (tria eldono) estas 50 000 pol. mk., pagotaj al Pocztowa Kasa Oaznedności, Warszawa, Konto N-ro 41 059 (prof. Kronenberg.) Ĝis nun finis la skriban kurson ĉirkaŭ 500 polujanoj.

S-o N. Szor, en Lodz (Pol.), Aleja 1-ego Majaj 11 deziras korespondi kun tuta mondo pri ĉiuj temoj per il. pk. kaj let. Interŝanĝas ankaŭ pm. [2]

S-o Franz Burda, Wien, IX., Van Svietsengasse 1, Aŭstrio, deziras korespondi kun ĉiulandanoj ĉefe nur per ilustritaj poŝtmarkoj. [2]

Fraŭlo 58-jara deziras korespondi kun ĉarmaj fraŭlinoj de 20—30 jaroj el la tuta mondo. Otto Schmidt en Trautenau, Körnerstr. 9. (Ĉeĥoslov.) Mi vizitos la XV-an en Nürnberg. [2]

S-o Erik Carlén, Yxhult, Kumla (Sved.) deziras korespondi kun rusaj, polaj kaj japanaj gimnazianoj (studentoj) per kartoj aŭ leteroj, kaj f-ino Göta Carlberg, Sköllersta (Sved.) per il. pk. kun italoj kaj rusoj. [2]

S-o Petros Farrés, c. Montserrat, en Vich (Hisp.) deziras korespondi per il. pk. kaj let. kun afrikaj, aziaj kaj centro-sud-amerikaj landoj. [2]

S-ino Siiri Vainio, s-ino Sandra Vesanto kaj s-o Hugo Vesanto, J. Rovertink. 48. D en Helsinki (Finl.) deziras interŝanĝi il. pk. kun gesamideanoj de ĉiuj landoj. [2]

Gesamideanoj! Atentu! Du 25-jaraj svedoj deziras korespondi letere kaj poŝtarte per perfektigitaj en Esperanto. Oskar Åsberg kaj Oskar Fredriksson en Lysekil (Sved.) Ramsvik. [2]

Por propagando celo mi deziras korespondi ĉiumaniere kun gesamideanoj ĉiulandaj. Precipe mi serĉas korespondantojn por poŝtfliscioj. — Bohumil Otava en Opava, fin. fed. (Ĉeĥosl.). [2]

S-o Jacinto Comella, Plassa Major 18, en Vich (Hisp.) deziras korespondi per il. pk. kaj let. kun afrikaj, aziaj kaj centro-sud-amerikaj landoj. [2]

S-o Monvids Kuĉs en Alukene (Latv.) Tirtotaju iela, korespondas per il. pk. kaj interŝanĝas pm. [1]

Hugo Steiner, inspektoro de aŭstria ŝtiferovojo, en Bisamberg 248, apud Wien deziras interŝanĝi pm. kun tuta mondo laŭ katalogo, donas ankaŭ kompletajn seriojn de pm. kaj helpmono. Ne sendas unue; resendas tuj. [2]

Junaj kursanoj deziras korespondi kiel ajn kun ĝejuoj de la tuta mondo. Skribu al s-o Stefan N. Vardev en Petrič (Bulg.). [4]

Al ĉi, kiu sendis al mi per rekomendita letero belan panoramkarton kun urbido 9—20 cm alta, 30—60 cm longa) mi leveros tuj kompletan kolekton de ĉeĥoslovakaj pm. (87 pecoj de 1—600 heteroj) Vinc. Milbühner en Trautenau, Kirchenlaube (Ĉeĥosl.). [1]

S-o Carl Sauermann, Wien, XIX., Nusswaldgasse 28, Aŭstrio, deziras korespondadon kun ĉiulandanoj. [2]

La viro sur la palisaro.

Eksupozu, ke ĉiuj el la laboristoj en la vastega mondo maldormigu morgaŭ matene kun nur unu konvinko en la menso, kaj permesu do, ke tiu konvinko estus pro la socialista doktrino. Supozu, ke ĉiuj sopirus al la feliĉeco kaj justeco tenataj en la promeso socialista.

Ke tio estas ebleco nur en la sfero de konjekto, mi konstatas tiel klare, kiel vi, kara leganto; kaj mi ankaŭ konstatas bone, ke estos la fajfegoj de la fabrikejoj, kiuj alvokos nin morgaŭ kaj postmorgaŭ; — tamen nur permesu momente, ke ni imagas, ke la plebejaro volas super la alia por posedi kaj administradi la ilojn, per kiuj ili fabrikas siajn bezonaĵojn kaj nutraĵojn. Ni klopodos senfine por influi la homojn ekdeziiri tion, sed eĉ se ili ja volis tion, ĉu ili povas administradi la aferojn, post kiam ili gajnis la ŝancon; ĉu la laborantoj havas la lertecon kaj kierecon postulatan de tia komplika afero, kia estas nuntempa socio?

Vi eble respondas jese, eble nee; tamen vi konsentos, ke la laborantoj de la mondo nepre trovos la taskon pli malpli facila laŭ la instruo kaj ekzercado, kiun ili travivas antaŭ la kriztagoj.

Ekzistas en la mondo unu loko hodiaŭ, kie la laborantoj efektivegas la kooperan sistemon kaj laborante lernas. Ili laboras kun ardo kiu igas la tienaskitojn malfermi la buŝojn kun mirplena elvoko: „Kio estas al ili?“

La fajfo sonas; iam la laborantoj haltas, iam ili daŭras sen rigardo je la horo; dimanĉe, festtage kaj ĉe la laboro ili ridkantetas sed, ial, oni ne aŭdas eĉ unu vorton pri la filozofio de socialismo.

Kaj la tienaskitoj rigardas la infanojn en la kampoj lernantaj kulturi la kreskaĵojn kaj tiujn en la urbeto lernantaj brikmasoni kaj tiujn en la fabrikejoj lernantaj tani la ledon kaj fabrikli la ŝuojn, kiujn ili poste portos, kaj ĉi tion faranta sen ia direkto de eksploatisto tute senkomprensita pri la signifo de tia neŝanca gaja laboro aŭ pri la fakto, ke la laboraĵo estas sole por la laboranto.

Se tiuj tienaskitoj aŭskultus, ili aŭdus kelkfoje vorton aŭ frazon el fremda lingvo, kaj se ili ĉestus kunvenon de la maturuloj, ili aŭdus strangajn herezojn kaj ideojn tiel fremdajn al ili, ke ĉi tiuj povus esti ĉerpitaj el la sanskrito; sed ili vidas nenion, aŭdas nenion, imagas nenion, escepte ke tiu ĉi stranga popolamaso estas frenezularo, kiu laboras kvazaŭ la diablo pelus ĝin.

Iam, je okazo, kiam la tienaskitoj kondukas solenan enterigon de unu el la veteranoj de preskaŭ forgesita milito, ili marŝas malantaŭ la muzikistaro, kiun tiuj frenezuloj provizas, kaj tiam ili ekscias, ke la frenezuloj estas ĝenilaj kaj amikemaj —. Spite, la fakto restas, ke ili laboras preter la limoj raciaj.

Ĉu estas la leganto de tiu ĉi gazeto simila al la tienaskito? Ĉu oni povas rigardi tian laboron ne ekvidante eĉ la plej malgrandan ekvidon pri la signifo de tiu ĉi frenezeco?

Sidiĝu sur la palisaro apud la tienaskito kaj vidu vi mem per lego de dektri-mil-vorta broŝuro pri la signifaĵoj, kiujn ilaj okuloj vidas, sed ne komprenas.

Rigardu kaj lernu, ĉu tio ne estas laŭ mia pretendo la plej grava universitato por kooperaj komunumaj konstruantoj, kiun vi jam imagis. Petu per via legebla adreso la broŝuron de E. A. Young, Balboa Heights, Canal Zone, Panama. Sendota kiel presajo kontraŭ du respondkuponoj; kiel letero 4 resp. kup.; rekomendite 6 resp. kup.

Josef Krejci, en Trautenau, Steinbruchgasse 14 (Ĉeĥosl.) deziras interŝanĝi pm. de ĉiuj landoj. [1]

S-o R. Estko, en Wilno (Pol.) str. Ad. Mickiewiczza 24—9 interŝanĝas pm. polajn kaj rusajn kontraŭ alilandaj. [1]

Por elekto mi sendas 50—100 pm. de Polujo, Litovujo, Danzigujo kaj plebisitaj-regionoj. Deponpagon oni sendu al St. Kowalewski, en Bydgoszcz (Pol.) Welniany Bynek 15. [2]

S-o Stefan Bontlecki, en Bydgoszcz, Berlinska 85 (Pol.) deziras koresponde interŝanĝi il. pk., pm., papermonon kun ĉiuj landoj. Sendinto de unu serio de alilandaj pm. risevas polan serion. [2]

E de Klamert en Budapest VIII., Praterstr. 46. Esperanta Komisio. Esperantaj libroj kaj ĉiusepacaj Esperantaĵoj el la tuta mondo estas konstante riceveblaj. Korespondas kaj interŝanĝas diversajn. [1]

Josefo Strabak en Budapest VII, (Hung.) Telep u. 32 deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj (pm. bfl.). [1]

Johano Micsuch en Budapest VIII, Telek placo 4.—4 deziras korespondi kun ĉiulandaj gekamaradoj per il. pk. (pm. bfl.) kaj let. [1]

F-ino Marg. Claßen, Düsseldorf (Germ.) Brunnenstr. 71 deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj. Donas: Danzig, Allenstein, germ. koloniaj kip., ankaŭ librojn, Esperantaĵojn kontraŭ pm. Sendu nur bonajn, sufiĉe grandkvante, sed ne bagatelajn. [2]

Kiu bankisto el Anglujo, Danujo, Holando, Svedujo aŭ Svislando korespondos kun samprofesulo (vizionta la XV-an)? Kolektas ankaŭ tipe fremdlandajn bildkartojn. — s-o L. Funken, Fiorinsmarkt 7a i. en Koblenz (Germ.). [1]

S-o Gust. Johansson, Slussen 10 en Falun (Sved.) serĉas korespondantojn por siaj kursanoj. [1]

S-o William Carter, 13 Kimberley Gardens, Newcastle-on-Tyne (Angl.) deziras de Eŭropaj papill-kolektoj (precipe skandinaviaj, svisaj, sudrusaj) specimenojn de „Lycaena Astrarache“. Bona interŝanĝo. Korespondas angle, Esperante, france, germane. [3]

S-o F. Basey, 474 Shields Road, Heaton Newcastle-on-Tyne, (Angl.) serĉas korespondantojn por siaj lernantoj, letere aŭ poŝtarte kun ĉiuj landoj. [1]

S-o Geo. Sheperd, 166 Holtsparst. Heaton, Newcastle-on-Tyne (Angl.) deziras korespondi letere aŭ poŝtarte kun bontemplanoj (i. O. G. T.-anoj) kaj abstinenculoj. [1]

Mi deziras korespondi letere kun negermanaj samideanoj. — F-ino Grete Altendorf en Köln a. Rh. (Germ.) Friesenwall 58. II. [1]